

V-19479

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



5

MAJO 1959 * JARO XXVIII

BULGARA ESPERANTISTO

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov
Redakta komitato: Ivan Sarafov,
Stefka Hristova, Stefan Kiraĝlev,
Stefan Maserov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por eksterlando — 16 levoj, 1,5
dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Tarifo por reklamoj: 5 levoj por 1 cm²;
korespondanoncoj — 1 levo por
ĉiu vorto; eksterlandanaj adresoj
estas presataj senpage.



KONKURSO

Okaze de la ZAMENHOFA
jaro la redakcio de «Bulgara
esperantisto» organizas kon-
kurson por plej bonaj belartaj
verkoj (versaĵoj, rakontoj, ski-
zoj, pentraĵoj k. a.) pri la aŭ-
toro de Esperanto kaj ĝia verko.
La verkoj povas esti skribitaj en
Esperanto aŭ en bulgara ling-
vo.

Templimo de la konkurso —
la fino de novembro 1959.

E N H A V O

Violin Oljanov. Abonigado al „Bulgara esperantisto“ — plej grava tasko de la societoj kaj la aktivularo (ĉefartikolo)	1
Dum la 1959 jaro — 4 500 mem- broj!	2
Al streĉa laboro por 65 novaj lokaj Esperanto-societoj dum la Zamenhofa jaro!	4
Organiza vivo (St. Dimitrov, Dojrenci, Batoŝevo, Polski Trambeŝ, Vidin).	4
Simeon Atanasov. Bona ideo efektiviĝis	6
Dobri Dobrev. Internacia junu- lara kunveno de TEJO	8
S. S. En Varna la gejunuloj ak- tive laboras por disvastigo de la internacia lingvo	7
Hr. Marinov Gorov. Esperanti- stoj pereintaj por la libero — David Sasonov	8
Literaturaj pagoj:	
Simeon Ĉirpanliev. Monumento (versaĵo)	10
Dimčo Debeljanov. Hela kredo (versaĵo)	10
Georgi Karaslavov. Agla roko (fragmento)	11
Junulara printempa kanto (kanto)	14
Ada. Lingva konsilejo — Bul- garismoj en Esperanto	15
Dobri Dobrev. En la disputo na- skiĝas la vero — Pri la majus- kloj	16



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

ABONIGADO AL „BULGARA ESPERANTISTO“ — PLEJ GRAVA TASKO DE LA SOCIETOJ KAJ LA AKTIVULARO

La eldonado de presorgano estas fundamenta kaj plej grava aktiveco de ĉiu amasa socia kaj kultura organizaĵo. Ĉar ĝi estas la konstanta ligilo inter la anaro kaj la centra estraro. Sen presorgano ne povas ekzisti firma, bone organizita asocio. Pro tio nia tuta atento devas koncentriĝi al la plibonigo de tiu fundamente gravega sektoro de nia laboro.

Bedaŭrinde ekzistas samideanoj eĉ ankaŭ en la Centra komitato, kiuj ne komprenas la esencon de la ĵurnalisma laboro kaj subtakscas la signifon de «Bulgara esperantisto» por nia movado. La postsekvojn de tiu malatento la redakta komitato ankoraŭ sentas en sia tre malfacila laboro.

Tamen dank' al la abnegacieco kaj persisto de la redakcianoj la baroj kaj malhelpoj unu post alia estas venkataj. Nia kara organo aperas jam pli-malpli regule, en bela ekstera aspekto, kun varia kaj bonkvalita enhavo. La redakta komitato daŭrigas la batalon por ĝia konstanta plubonigado. En tiu rilato ni esperas renkonti la helpon de ĉiuj Esperanto-aktivuloj, korespondantoj, verkemuloj. Ni volonte kaj kun ĝojo pridiskutos ĉies propordimanoj!

Nun la plej ĉefa kaj respondeca tasko de la societoj kaj de la aktivuloj estas varbi novajn abonantojn. Iuj el la societoj montris ĝis nun laŭdindan agadon en tiu direkto kaj havas bonajn rezultojn. Ekzemple en Vraca ni havas 35 abonantojn, en Tarnovo — 36, en Dimitrovo — 26. Apartan dankon kaj gratulon ni esprimas al la samideanoj el vilaĝo Pordim, kiuj varbis 23 abonantojn! Tia societo nature elstaras antaŭ la Centra komitato kaj la asocio kiel aŭtoritata kaj solida organizaĵo. Honoron al la bravaj pordimanoj!

Sed estas societoj, kiuj tute neglektis la gravegan taskon por varbado de abonantoj. Kiumaniere senkulpigos sin la samideanoj el Sevlievo, kiuj varbis nur 6 abonantojn. Ĉu ne estas evidenta pruvo por subtakso de la signifo de nia presorgano la fakto, ke la vigla societo en Pleven, kiu havas pli ol 80 regulajn membrojn, varbis nur 6 abonantojn?! Kaj la Levskigrada societo, kiu antaŭ unu jaro ricevis la standardon de CK de BEA, ŝajne, ekdormis sur sia pasinta gloro. Ĝiaj abonantoj ankaŭ montras la mizeran

ciferon 6. Ĉu ne hontas la estraro de la glora «Albatro» en Varna, kies loko estas inter la unuaj societoj en la lando, kiu agas en granda kaj somer-restadeja urbo kun internacia famo, en kiu okazis la plej brila en la historio de la Bulgara Esperanto-movado kongreso? Jes, ĝi devas honti, havante nur 10 abonantojn. Ni emfazas, ke tie estas eĉ membro de CK de la asocio! Estas iuj societoj, en kiuj eĉ membroj de la estraro ne ricevas la gazeton.

Ni tuj devas likvidi tiujn gravajn mankojn en nia laboro. Ĉiu esperantisto devas ricevi la asocian organon. Per ĝi oni estas informataj pri la movado en la lando kaj eksterlande, oni trovas en ĝi bonan legajon, trovas adresojn por korespondado. Kia aktivulo de nia movado estas tiu, kiu ne legas sian presorganon, informantan pri ĉiuj Esperanto-novaĵoj kaj instrukciantan lin pri la laboro en la societo?

Ni esperas, ke la tuta nia anaro helpos la redakcian komitaton en ĝiaj penoj plibonigi kaj plibeligi nian tre karan «Bulgara esperantisto» — per amasa abonado kaj abonigado.

DUM LA 1959 JARO — 4500 MEMBROJ!

Laŭ decido de la dua plenkunsido, okazinta la 4-an de januaro j. k. la asociaj membroj dum tiu ĉi jaro devas atingi la ciferon 4.500. Sed por tiu grava tasko ĉiu societo, ĉiu aparta esperantisto devas streĉi siajn fortojn. De neniuj societo ĝis nun ni ricevis neakcepton de la kontrola cifero. Do ili povas esti konsiderataj akceptitaj. La societoj nun devas ellabori konkretan planon, kiumaniere ili atingos la difinitan nombron. La CK sur tiu bazo organizos konkuradon inter la societoj. En la sekvonta numero ni publikigos la kondiĉojn de la konkurado. La rezultojn de la konkurado ni sciigos en BE per tabeloj ankoraŭ 3-foje: en la aŭgusta, novembra kaj februara n-roj (post ĉiu trimonato).

Nun ni publikigas tabelon de la societoj kun la nombro de la regulaj membroj dum 1958 kaj la kontrolaj ciferoj por tiu ĉi jaro.

Societoj	Nombro de la membroj		Unua trimonato de 1959
	1958	Kontrolaj ciferoj por 1959	
1. Asenovgrad — «D. Sasonov»	62	72	
2. Beglej (Plevna distr.) — «Aŭroro»	10	12	
3. Belogradĉik — «Eĥo de la rokoj»	4	8	
4. Belozem (Plovdiva distr.)	4	8	
5. Berkovica — «Verda stelo»	27	35	
6. Bjala	18	25	
7. Blagoevgrad	24	30	
8. Bogdan (Plovdiva distr.)	10	12	
9. Borima (Loveĉa distr.) — «Nova mondo»	63	70	
10. Borovo (Ruse distr.)	23	30	
11. Botevgrad	6	12	
12. Bracigovo — «V. Miŝev»	5	10	
13. Buhovo (Sofia distr.) — «Komsomola solidareco»	11	14	
14. Burgas — «Nigra maro»	70	100	25
15. Ĉirpan — «Mondamikeco»	14	20	
16. Dimitrovgrad — «Espero»	47	90	96
17. Dimitrovo — «Nova vojo»	16	25	16

Societoj	Nombro de la membroj		Unua trimonato de 1959
	1958	Kontrolaj ciferoj por 1959	
18. Dve Mogili (Ruse distr.)	—	12	10
19. Gabrovo — «Verda torĉo»	34	60	
20. Goce Delĉev — «Pirin»	42	50	
21. Gorna Orjahovica — «Espero»	14	20	
22. Gorna Orjahovica—stacidomo	—	12	
23. Gor. Domljan (Plovdiva distr.)	9	12	
24. Govedarci (Sofia distr.)	14	18	
25. Haskovo — «Asen Zlatarov»	20	25	
26. Ispcrih	16	22	
27. Jambol — «Maksim Gorkij»	30	45	
28. Kamenovo (Stara Zagora distr.) — «Zagora esperantisto»	7	12	26
29. Kârĝali — «Stelo»	21	30	
30. Kazanlâk — «Roza valo»	35	50	
31. Kjustendil — «Flamo»	24	40	
32. Klisura	12	15	
33. Kneja — «Agro»	10	18	
34. Kolarovgrad — «Vekiĝo»	79	120	
35. Kriĉim (Plovdiva distr.)	—	8	
36. Kubrat — «Progreso»	43	60	
37. Lehĉevo (Mihajlovgrada distr.) — «Pacdefendanto»	25	28	
38. Levski — «Trumpetisto»	26	30	12
39. Levskigrad — «Vasil Levski»	77	110	
40. Ljubimec — «Ruĝa stelo»	10	12	
41. Loveĉ — «Espero»	20	25	
42. Miĉurin — «Amikeco»	85	85	
43. Nova Zagora — «Edmond Privat»	9	15	
44. Orjahovo — «L. L. Zamenhof»	18	25	
45. Panagjuriŝte — «Nova stelo»	10	15	
46. Pârvomaj	—	10	4
47. Pazarĝik — «Radio»	66	80	
48. Petriĉ — «Esperanto triumfonta»	20	30	
49. Peŝtera — «Nova epoko»	12	20	
50. Pleven — «Esperanto»	62	90	
51. Plovdiv — «Kulturo»	290	375	
52. Poljanovgrad — «Mondpaco»	20	30	
53. Polski Trâmbeŝ — «Progreso»	12	20	
54. Popovo — «Homeco»	23	35	
55. Pordim (Plevana distr.) — «Verda stelo»	10	15	6
56. Râjevo Konare (Plovdiva distr.) — «Ruĝa stelo»	10	15	
57. Prolom (Plovdiva distr.)	—	6	
58. Rozino (Plovdiva distr.) — «Stelo de l' paco»	32	35	
59. Ruse — «Liberco»	58	70	
60. Samokov — «Rila esperantisto»	16	25	
61. Sevlievo — «Fratiga stelo»	23	40	
62. Sliven — «Espero»	28	45	
63. Silistra	—	10	52
64. Sofio — «Maksim Gorkij»	271	400	
65. Sofio — «Heroldo» (poŝtista)	26	36	
66. Sofio — fervojista	101	170	
67. Sofio — (blindula)	22	22	
68. Bankja (Sofia distr.) — «Solidareco»	16	30	
69. Stanke Dimitrov — «Marek»	45	55	
70. Stara Zagora — «Verda stelo»	40	50	
71. Ŝtrâklevo (Rusena distr.)	12	15	

72. Svištov — «Danuba stelo»	18	25	
73. Târgoviște — «Verda eskadrono»	—	17	
74. Târnovo — «Lumo»	50	75	26
75. Teteven	—	6	
76. Tolbuhin — «Paco»	25	40	17
77. Trjavna	—	15	
78. Trojan — «Balkana stelo»	42	50	
79. Trud (Plovdiva distr.) — «Paco»	13	18	12
80. Varna — «Albatro»	255	355	
81. Velingrad	24	30	
82. Vidin — «Espero»	18	25	
83. Vladimirovo (Mihajlovgrada distr.)	17	20	7
84. Vraca — «Sukceso»	30	55	21
85. Zimnica (Jambola distr.)	—	6	

La tabelo montras ne tre belan bildon de la stato dum la unua trimonato. La plimulto de la societoj ankoraŭ ne pagis eĉ por unu membro la kotizon. Nur kelkaj societoj alproksimiĝis al la kontrolaj ciferoj, aŭ ilin superis.

Unuan lokon dum la unua trimonato okupis la samokova societo «Rila esperantisto», kiu superas la kontrolan ciferon per 5 membroj, aŭ la societo plenumis la planon 120%. Duan lokon okupis la dimitrovgrada societo «Espero», kiu anstataŭ por 90 pagis la kotizon por 96 membroj, aŭ plenumis la planon 106.7%. Ni gratulas ambaŭ societojn pri la unuaj sukcesoj! Bone komencis ankaŭ plevenanoj kaj levskianoj, kiuj preskaŭ atingis la kontrolajn ciferojn.

Ni esperas, ke ĉiuj societoj ekpartoprenos en la tutlanda konkurado kaj streĉos siajn fortojn por plenumo kaj superplenumo de nia plano.

Antaŭen, al novaj venkoj!

AL STREĈA LABORO POR 65 NOVAJ LOKAJ ESPERANTO-SOCIETOJ DUM LA ZAMENHOFA JARO!

Listo

de novefonditaj societoj

4. Vilaĝo **Batoŝevo**, distrikto de Gabrovo, (fondita la 23-an de marto) kun 11 membroj
5. Urbo **Smoljan** (fondita la 16-an de aprilo) kun 17 membroj.
6. Urbo **Razgrad** (fondita la 10-an de aprilo) kun 14 membroj.
(daŭrigota)



NOVAJ KURSOJ

La Esperanto-societo «Marek» en urbo St. Dimitrov komencis dum ĉi printempo viglan agadon por organizo de novaj kursoj. La 2-an de marto komencis funkcii tri kursoj por ko-

mencantoj. K-do Krastev, gimnazia instruisto gvidas kurson kun 35 gelernantoj. En la kurso por civitanoj, gvidata de k-do B. Drenski, partoprenas 15 gekursanoj. En la tria kurso,

gvidata de k-do K. Veličkov en komuna lernanta loĝejo, partoprenas 16 gelernantoj el la superaj klasoj de la gimnazio kaj de la teknika mezlernejo.

La entuziasmo de la gekursanoj estas granda kaj ni klopodas deteni ĝin, ĝis la sukcesa fino de la kursoj.

Baldaŭ la societo aranĝos prelegon kaj ekspozicion en ambaŭ gimnazioj por ekinteresi la lernantojn pri la internacia lingvo kaj organizi tie novajn kursojn.

Iv. Dobrovski

NOVA SOCIETO

La 23-an de marto 1959 j. en vilaĝo Batoŝevo, distrikto de Gabrovo, estis fondita nova Esperanto-societo. Ĝi nombras 11 membrojn. La nomo de la nova societo estas «Amikeco».

La fondkunveno elektis la jenan estraron: Hristo Kovačev — prezidanto, Atanas Tatev — sekretario kaj Serafim Serafimov — membro. Kontrola komisiono: Marin Mitev, Jakim Tiškov kaj Penčo Dočev.

Ni gratulas niajn samideanojn el vilaĝo Batoŝevo kaj bondeziras al ili daŭrajn sukcesojn en ilia agado por disvastigo de Esperanto.

VIDIN — La 25-an de marto nia Esperanto-societo organizis jaran kunvenon. La prezidanto raportis pri la unujara agado kaj pri la financa stato de la societo. Li diris, ke ni finis pasintan jaron kun 18 regulaj membroj kaj ni akceptas la proponon de la CK por plikresko de la anaro ĝis 37 membroj. Oni elektis novan estraron kun fervoraj kaj sindonaj junaj esperantistoj: Emilija Joceva —

En vilaĝo Dojrenci, distrikto de Loveĉ, samideanoj Bejko Markov kaj Petar Ninkov, fervojisto, malfermis novan kurson kun pli ol 30 gekursanoj. La unua leciono okazis la 1-an de aprilo k. j.

Tiu kurso estas rezulto de la aktiva propaganda laboro de niaj samideanoj. Ili organizis en la vilaĝa kulturdomo kunvenon pri Esperanto kun prelego de k-do B. Markov kaj literatura programo. Samtempe ili aranĝis unusemajnan ekspozicion de esperantaj libroj, gazetoj, leteroj, ktp.

K. Uzunova

POLSKI TRAMBEŜ. La 24-an de marto 1959, la vilaĝa popolkonsilantaro akceptis decidon: unu el la parkoj de la vilaĝo estu nomata «parko Esperanto». La societanoj siaflanke prizorgados la parkon, por ke ĝi plibeliĝu kaj faru bonan propagandon por Esperanto. La kunsidon partoprenis ankaŭ la sekretario de la komunista partio en la unuigita agrikultura kooperativo, kiu montris sian tute favoran rilaton al nia laboro. Tiamaniere, la verda stelo kaj la vorto «Esperanto» staros por eterne sur la speciala tabelo antaŭ la parko, en la centro de Polski Trambeŝ, inter la stacidomo kaj la ŝoseo Ruse—Stara Zagora.

Ĥr. Manolov

sekretariino, Vera Stojčeva — kasisfino kaj Julija Peeva — kulturklerigantino. La kunveno aprobis la planon pri la estonta agado kaj decidis, ke oni preparu sloganojn okaze de la voĉdonado de la 5-a de aprilo: «Esperantistoj, voĉdonu por la kandidatoj de la Patrolanda fronto!» kaj «Esperanto estas lingvo de amikeco inter la popoloj».

G. Simeonov

BONA IDEO EFEKTIVIĜIS

La 21-an de marto ĉe la Sofia Esp.-societo «Maksim Gorkij» kreiĝis Esperanta amatora klubo por kino-kaj fotokulturo.

La bela kaj interesa ideo pri tio, donita de la samideanoj-kinematografiistoj, estas jam realeco.

Tio ĝojigis multe da gesamideanoj, kiuj interesiĝas pri tiu afero de la nuntempa kulturo.

Kaj ĝi estas tiel riĉa, tiel alloga! Kion prezentas la amatoraj kino-foto-kluboj en nia lando? Ilia nombro nun ne estas granda — ĉirkaŭ dek. Iliaj eblecoj ankaŭ estas limigitaj pro la manko de materiala bazo, aparataro ktp. Sed la homoj, varmegaj amatoroj de la kino kaj foto-arto estas la plej bona kapitalo de tiuj ĉi kluboj; la nunaj rezultoj de ilia agado — la unuaj filmoj montras, ke la amatora kino-movado kreskas, disvastiĝas, faras sukcesojn. Kion prezentas la unuaj en nia lando Esperanto amatora kino-foto-klubo! Ĝia specifo estas tio, ke ĝi ne estas amatora klubo ĝenerale, sed **Esperanta** amatora klubo. Tio difinas ĝiajn taskojn.

Ĝiaj bazaj taskoj estas: pligrandigi la sciojn de siaj membroj pri la kino- kaj fotoarto, krei fotografaĵojn kaj filmojn, efektiviĝi ligojn kun aliaj E-kluboj similaj kaj eble interŝanĝi kun ili sperton, filmojn kaj fotoekspoziciojn.

Serioza baza tasko de la klubo es-

tas la propaganda laboro pri la Esp.-movado mem. Kiamaniere la provizora estraro intencas gvidi la laboron por atingi tiujn ĉi celojn? Unue ni komencos foto-kurson. Samtempe la kursanoj ricevos la unuajn sciojn pri la kino (konatiĝo kun la filmaparatoj, manipulado ktp.). Tio donas eblecon, ke en baldaŭa tempo la klubanoj entreprenu praktikan ekzercon. Ili povas fari sub la gvido de spertaj samideanoj-kinematografiistoj la unuajn filmetojn (pli ĝuste film-raportajojn) pri la vivo de la esperantistaro: solenaĵoj, festo de la rozoj en Rozino, esperantistaj brigaĵoj, ekskursoj ka.

Verŝajne ni filmigos la universalan E — kongreson en Varsovio.

Kiel oni vidas — la vivo proponas multnombrajn interesajn temojn.

Sendube la granda signifo de la Esperanta kino-foto-klubo por ni, la geesperantistoj en Sofio, estas antaŭ ĉio en ĝia ebleco esti fortega propaganda faktoro de niaj altaj ideoj, faktoro por la disvastigo de la E-movado en la ĉefurbo kaj la lando.

Malfacilaj, sed noblaj, indaj estas la celoj, kiujn ni devas atingi. La pura entuziasmo kaj amo al la afero de niaj anoj, ilia preteco por senlaca laboro kaj lukto ĝis venko estas garantio por estontaj sukcesoj.

Simeon Atanasov
(estrarano de la EAKFK)

JUNULARO SUR POSTENO

INTERNACIA JUNULARA KUNVENO DE TEJO

Jam estiĝis tradicio, ke antaŭ ĉiu universala kongreso de UEA okazu junulara kunveno de la Tutmonda esperantista junulara organizo (TEJO). Ĉiujare gejunuloj — reprezentantoj de diversaj landoj kolektiĝas kaj dum unu semajno pri-

traktas multajn demandojn pri la organiza vivo de la tutmonda esperantista junulara organizaĵo. La kunveno elektas Estraron de TEJO kaj planas iniciatojn pri la plifortigo de la ligoj inter la junaj geesperantistoj el la tuta mondo kaj pri la plura dis-

vastigo de Esperanto en la junularaj medioj.

Ankaŭ ĉi-jare, antaŭ la 44-a Universala kongreso de la 24 ĝis la 31 de julio en Gdansk, Pollando, okazos la 15-a internacia junulara kunveno de TEJO. Ĝi estas oficiala antaŭkongreso kaj pasos sub la honora protektado de la prezidanto de la Vojvodia nacia konsilantaro — S-ro Jozef Ŭotek kaj sub la aŭspicio de la Loka kongresa komitato de la 44-a UK de Esperanto en Varsovio.

La provizora programo de la kunveno estas jena: interamikiĝa vespero, solena inaŭguro, vizito de tri urboj (Gdansk, Sopot, Gdinja) dum tuttaga aŭtobusekskurso tra la regiono, jaĥtekskurso tra la Gdanska golfo, laborkunsidoj de TEJO, kulturaj prelegoj, oratora konkurso, folkloraj kaj gajaj vesperoj, solena fermo kaj forveturo en karavano al la 44-a universala kongreso de Esperanto en Varsovio.

Dobri Dobrev

EN VARNA LA GEJUNULOJ AKTIVE LABORAS POR DISVASTIGO DE LA INTERNACIA LINGVO

La okazinta pasintjare en Varna 33-a kongreso de BEA multe kontribuis por la disvastigo de Esperanto inter la junularo de la urbo. La junaj geesperantistoj en Varna estas organizitaj en la junulara esperantista grupo «Verda lumturo» ĉe societo «Albatro». Ili bone laboras por plua multnombro de la junaj geesperantistoj en la urbo.

Pasintjare la junulara grupo organizis kvar kursojn por komencantoj. La plimulto el la gekursanoj nun studas en kursoj por progresintoj. Antaŭ nelonge oni organizis du novajn kursojn por komencantoj en fabriko «1-a de majo», ĉiu el ili kun pli ol 30 kursaninoj. Bone laboras la kursoj en fabriko «Karl Marks» kaj

en la ŝipkonstrua uzino «G. Dimitrov».

La gejunuloj aktive helpas la urban societon en la organizado de gravaj iniciatoj, kiel la tradicia «Vespero pri Esperanto» okazanta ĉiujare en la somerrestadejo Varna de Balkan-turist. La junuloj eĉ memstare organizas vesperamuzojn en la urba kazono, en fabriko «1-a de majo» kaj aliloke.

La estraro de la grupo kunsidas regule kaj laboras laŭ trimonataj planoj. La plej entuziasmaj junulgvidantoj estis M. Surapjan, A. Kerkin, V. Taŝeva, Val. Kolarov, Hr. Najdenov kaj aliaj.

S. S.

BULGARA ESPERANTISTA KOOPERATIVO

Sofia, bulv. Stalin 40
Liveras diversajn esperantaĵojn

POSEDAS BELAJN LIBREJOJN
EN SOFIO

Akceptas abonojn al «Nuntempa Bulgario» kaj al multaj aliaj gazetoj.


UNUIGAS: 900 membrojn el la tuta lando

**JUS APERIS EN BELA ELDO-
NAJO «BOFILINO», ROMANO
DE G. KARASLAVOV**

prezo lv. 13.28

*Interŝanĝas siajn Esperanto-
presaĵojn kontraŭ alilandaj lib-
roj kaj gazetoj.*

DAVID SASONOV



David Sasonov naskiĝis la 24-an de decembro 1907, en Asenovgrad. Infanecon kaj lernejon li pasigis en sia naskurbo.

Honesta inteligentulo kun forta volo kaj nevenkebla spirito — tia estis la fama asenovgrada esperantisto David Sasonov — Davo.

Kiel juna gimnaziano li estas diligenta kaj sciama. Dank' al tio li fariĝis instruita jam en la fino de la gimnazia studado. Li posedis la lingvojn rusan, germanan kaj Esperanton.

Naskita kaj kreskinta en meza komercfamilio, li ne amis sian klason kaj ĝian ennaskiĝintan aspiron al riĉaĵoj. Ankoraŭ malgranda, sub la influo de unu el siaj fratoj-komunisto, li amikiĝis kun malriĉaj knaboj, kio helpis al li de proksime ekkoni ilian vivon, iliajn revojn kaj aspirojn. En ilia medio li kiel gimnaziano ellernis la internacian lingvon Esperanto.

En la gimnazio per la helpo de progresema instruistoj de literaturo,

li ellaboris veran rilaton al la realisma bulgara literaturo kaj ĝiaj reprezentantoj. Li ekamis Botev, Vazov, Elin-Pelin, Javorov, P. Todorov, Hr Smirnenski, Geo Milev k. a. Studante en la iama Libera universitato, sian liberan tempon li dediĉis al korespondado kaj tradukado. Ellerninta ĝis perfekteco la lingvon de Zamenhof, David donis en bonaj tradukoj rakontojn de Vazov, Elin Pelin, P. Todorov. Liaj tradukoj estis presataj en grandaj esperantaj gazetoj, kiuj aperis en Eŭropo.

Kiam en 1929, en Asenovgrad oni fondis laboristan societon, David unua el la medio de la intelektuloj-esperantistoj enskribiĝis en ĝi. Li amis la simplajn laboristojn kaj al ili dediĉis sian junan vivon. Vicojn da jaroj li gvidis kursojn por laboristoj, ĉiam klopodante esti ne nur instruanto de internacia lingvo, sed ankaŭ kleriganto. Li levis al pli alta nivelo la kulturon de la laboristoj-esperantistoj. Multaj el liaj lernantoj fariĝis poste partizanoj.

En la somero de 1930 ni ambaŭ kun D. Sasonov alpaŝis al tradukado de la poemo «Septembro» de Geo Milev. Malfacile estis fari ekzaktan kaj artan tradukadon, sed ni sukcesis dank' al la granda prepariĝo kaj kulturo de Davo. Post kelkaj monatoj, en la komenco de 1931 «Septembro» aperis en USSR, kiel eldono de la proleta eldonejo «Ekrelo». En vico de progresema esperantaj gazetoj en Eŭropo kaj Azio aperis entuziasmaj recenzoj pri la poemo.

En la vivo de David Sasonov la traduko de «Septembro» ludis gravan rolon. De simpatianto li fariĝis organizita membro de Komsomolo (Komunista junulara asocio), kaj

poste ankaŭ de Bulgara komunista partio. Samtempe kun la kulturkleriga laboro en la esperanta laborista societo, li skribis sloganojn en defendo de USSR, kontraŭ la milito, legis kaj disvastigis nelaŭleĝajn eldonaĵojn, kaŝis revoluciulojn, kolektadis monrimedojn por la suferintoj de l' faŝismo. Li lerte agitis inter la inteligentularo.

Esperanto helpis al David fariĝi pli bona komunisto, instruita kaj konvinkita en la justa afero de la komunismo. Kiam ĉe ni oni persekutis ĉiun penson de Marks, Lenin, Stalin, la laboristoj ricevadis en traduko en Esperanto librojn kiel «La komunista manifesto», «La Ŝtato kaj la revolucio», «La fundamentoj de la leninismo» k.a. Se povus paroli la ŝtonoj kaj la arboj ĉe fortikaĵo de Asen kaj pinto Ruen, ili povus rakonti pri multaj prelegoj, kiujn Davo faris antaŭ junaj laboristoj. Li mem lernigis sin de tiuj ĉi maloftaj libroj, sed ankaŭ al la laboristoj li diris la veron, kiun li ĉerpis el ili.

Per la helpo de la komunista partio, la laborista esperantista societo fariĝis ĉiam pli amasa. Kreskis la internaciaj ligoj de Laborista esperantista asocio. En 1932-1933 la Centra komitato de Bulgara laborista esperantista asocio eldonis «Proletaran esperantan korespondadon». La traduko, la presado kaj la ekspedado de la bulteno estis komisiita al la asenovgrada esperantista organizaĵo. David Sasonov estis unu el la laboristoj por ĉiuj aferoj de la bulteno kune kun Hr. Marinov kaj Dim. Andreev.

La 19-maja registaro (1934) malpermesis la agadon de la Labor. esp. asocio, kiu transformiĝis sur neleĝan bazon. Ĉe la novaj pezaj kondiĉoj Davo daŭrigis la laboron. Li prenis la redaktadon de la multobligita ĵurnalo, kiun eldonis neleĝe la asenovgrada laborista esperantista societo.

Kiam en 1935 la faŝista aŭtoritato donis frapon al la Plovdiva esperanta laborista societo kaj sendis en la malliberejon ĝiajn gvidantojn, Davo ne ektimis. Li uzis Esperanton kaj apelis al la esperantistoj en okcidenta Eŭropo leviĝi en defendo de la malliberigitaj esperantistoj. En rezulto de tiu ĉi lia agado, en 1936 en nian landon alvenis delegacio de francaj juristoj, kiu vizitis la malliberejon en Plovdiv kaj informiĝis pri la mallibereja reĝimo, ĉe kiu estis metitaj la malliberuloj.

Ĉiam pli malfacila fariĝis la situacio de la Labor. esp.-movado. Davo kaj liaj kamaradoj denove enigis siajn fortojn en Bul. esp. asocion kaj apogante sin je la subteno de ĉiuj esperantistoj en Asenovgrad kaj ĝia regiono, daŭrigis la batalon por defendo de la paco, vice kun la tutpopola movado por paco. Li laboris por la demokratiigo de la lando, por subskribo de pakto por amikeco kaj proksimigo kun la granda Sovetunio.

Kiam ekflamis la dua mondmilito, por li estis neniam dubo, ke ĝi finiĝos nur kiam la faŝismo estos disfaligita. Pro tio li ankoraŭ pli energie daŭrigis sian antifaŝistan agadon. Li aktive helpis la partizanan movadon, rakontadis al siaj multnombraj konatuloj la veron pri Sovetunio. La faŝista polico ne indulgis al li pri tiu ĉi lia agado. Iun nokton li estis forprenita de lia hejmo kaj ekzilita en la ĉirkaŭaĵon de Zlatograd, proksime ĉe Karĝali. Metita ĉe netolereblaj kondiĉoj, la delikata organismo de Davo ne eltenis. La 13-an de Septembro 1942 li mortis malproksime de siaj parencoj kaj kamaradoj.

Jaroj pasis de la tago de lia morto. Sed la nomo de Davo eterne vivos en la koroj de la asenovgradaj komunistoj kaj esperantistoj. Ili neniam forgesos lian helan vizaĝon. Nun la esperantista societo en Asenovgrad portas lian nomon.

Hr. Marinov Gorov

Simeon Ĉirpanliev

Monumento

Glora datreveno! Ni, la nunvivantaj
naĝas en la lumo, kiun la lumanto —
la mortint' senmorta ĵetis en la mondon.
Nun la majstro vivas, vivas en la paca ondo
kiu sin verŝadas el sennombraj koroj,
batalantoj kontraŭ sangavidaj moroj,
kontraŭ bruligantoj de milit' atoma,
kaj la detruantoj de l' kulturo homa.

Lia tombo estas plata kaj modesta.
Kaj sur ĝi ne staras monument' majesta
konstruita de granito aŭ marmoro,
brile surskribita per literoj oraj.
Li ne havas tian ŝtonan monumenton,
kiu detruigĝas de tempesta vento,
de torenta pluvo, frosto kaj nebulo,
kaj de la armiloj de l' militkrimuloj.

Zamenhof nun vivas, vivas li kaj spiras
en la lingvo, kiu kantas kaj sopiras
pri frateca paco inter la popoloj,
pri laboro paca, kaj pri moroj molaj.

Inter la polusoj de planedo nia
ardaj verdstelanoj sin renkontas ĉie.
Nia majstro vivas en la vivaj vortoj
de la nova lingvo, nova kaj senmorta.

Lia monumento estas la epoko,
kiun li malkovris per la forta voko:
— Homoj, en la mondon venis nova sento!
Kaj la historio prenis ĉi eventon
kaj puŝadis ĝin antaŭen kaj antaŭen.
Ĝi hieraŭ estis semo, sed morgaŭe
estos ĝi arbaro sur la tuta tero.
Esperanto venkas! Kreskas la afero!

Jen: alvenas tagoj kvankam malproksimaj,
kiam oni skribos sur la landaj limoj:
— Vice kun gepatra lingvo tra la mondo
oni jam parolas lingvon Esperanton.
Kaj ĉi tio estas viva monumento
de la majstro kaj de ĉiuj homaj gentoj,
kiuj plenkonstruos la spiritan domon
de l' kulturo lingva kaj de l' nova homo.

Dimčo Debeljanov

HELA KREDO

Por mond' malnova venas lasta tag';
kateno sin disŝiras post kateno, —
kaj sur la ruinaĵoj kaj la plag'
elstaras de la ver' altar' solene.

Ekflugas la mallumo densa for,
la firmament' en lumo suna dronas.
Flirtigas flagojn digne kun fervor'
sennombra ar', sennombraj legioj.
Radioj brulas en okuloj nun,

kaj ilin ne timigas la malhelo,
ĉar antaŭ fort' ilia mortas tuj
la ombroj de la premo kaj sufero.

Vadejon ili trovis kun soif'
kaj vidas bordon en purpur' oruma...
O, hela kredo de la nova viv',
la korojn vi varmigas per la lumo!

El bulgara: At. Lakov

AGLA ROKO

Rodopa legendo

(Fragmento el samnoma romano por junularo)

En rodopa vilaĝo la sorĉaj kantoj de l' junulo Orfeo faciligas la pezan vivon de la malriĉaj montanoj. Senzorge vivas la juna muzikanto ĉe siaj gepatroj, kie paŝtas ŝafarojn li kaj lia amikino Dika. Sed baldaŭ la vivo de Orfeo malsereniĝas pro la kruela reganto de l' apudmara lando. La reganto venas serĉi savon el peza malsano ĉe la sanigaj fontoj apud la vilaĝo de Orfeo. Tie ĉi li aŭdas la kantojn de la knabo kaj konvinkas liajn gepatrojn kaj lin mem forkonduki lin en sian palacon.

En la riĉa palaco Orfeo trankviligas per sia arto la suferojn de la reganto, tamen vivas kiel kaptito. Ĉio estas por li fremda, la dommastroj estas malvarmaj kaj malafablaj — forestas la libera vivo en la montaro, liaj bonaj samvilaĝanoj, liaj karaj gepatroj, forestas ankaŭ Dika. Kaj Orfeo pripensas forkuron. Helpe de malriĉaj knaboj, liaj amikoj, li sukcesas forkuri. Baldaŭ lia forkuro estas malkovrita — la reganto sendas post li persekutantojn por kapti kaj revenigi lin. En la hejma vilaĝo Orfeo estas devigita sin kaŝi.

La tagoj forpasadis. Super la montaro komencis blovi malvarmaj ventoj. La foliaro de l' arboj flaviĝis, tie kaj tie el la arbaro eliĝis ruĝaj makuloj. Alproksimiĝis la tempo, kiam ĉiuj homoj devis prepari sin por vintrumo. La greno estis rikoltita, la nuksoj kaj la aveloj kolektitaj, la pomoj envolvitaj en muskon aŭ sekigitaj kaj enmetitaj en la sakojn, la fojno kaj la branĉetoj estis amasigitaj en la malvastajn kortojn aŭ proksime ĉe l' arbaro.

La gepatroj de Orfeo rompis fingrojn ne sciante, kion fari dum la pezaj vintraj monatoj. Se lin ne kaptos tiuj hundoj, li mortos pro malvarmo», balancis malĝoje kaj senespere kapon la maljunulo.

— Ni forkuru, filo mia! — lin petis la patrino. — Ni rifuĝos ĉe la profundajn arbarojn, kie eĉ la suno ne trovos nin.

— De la malbono, panjo, nenien oni povas forkuri! — respondis ĉiam ridete kaj kuraĝe Orfeo. — Forkuri kaj kaŝi min, tio signifas, ke mi neniam ekflutu, ĉar ekflutante, per la kanto oni min trovos.

Kaj unu tagon Orfeo diris al siaj gepatroj kaj al Dika, ke li sufiĉe longe atendis la foriron de la perse-

kutantoj kaj la gardistoj de l' reganto. Li eliros vagi en la montaron kaj farti libere kaj laŭscie, en batalo kontraŭ ĉiuj, kiuj prirabas la malriĉajn laboramajn homojn kaj persekutas la ĝojon kaj la liberecon.

La saman vesperon, kiam la suno dronis en fajraj buloj malantaŭ la malproksimaj pinarbaroj, el la Agla roko, el tie, kie iam Orfeo paŝtis sian etan ŝafaron, sin ekportis mirinda, vigla, sorĉdolĉa kanto. Suproj, arbaroj, valoj, arboj, herboj — ĉio kvazaŭ sin eklevetis surprizite kaj ridiĝinte. Delonge, tre delonge ne estis aŭskultataj tiaj kantoj en la surdiĝinta montaro.

Orfeo vokis je protesto kaj batalo kaj lia alvoko resonoris en la koroj de la malriĉaj montanoj.

La gardistoj kaj la persekutantoj, senditaj lin embusku kaj kapti, interrigardis sin kvazaŭ paŝtrafitaj. Jes, ludis ili! Li atendu — ili ĉirkaŭiros la tutan montaron, priserĉos ĉiun angulon, sed kaptos lin kaj forkondukos lin en la ĉefurbon. Tia estas la ordo de ties reganto. Kaj ili direktis sin anhelante al Agla roko. Tamen atinginte la supron, la rokoj resonis nur la majestatan kanton, kiu sin disportadis el la kontraŭaj suproj.

La gardistoj kaj la persekutantoj revenis ĉe la loĝlokon fleksigitaj pro kolero kaj senpovo. Ili kunvenigis la montanojn kaj je la nomo de la plej riĉa kaj plej potenca reganto ordonis al ili embuski la tutan montaron por kapti la senhumilan muzikanton. La homoj aŭskultis silente la severan ordonon kaj kliniĝinte kaj sulkiĝinte disiris.

Kaj la kantoj de Orfeo sin portadis super la krutaj rokaroj, super la senlimaj pinarbaroj, super la verdriĉaj montetoj, super arbustaroj kaj molaj, bonodoraj herbaroj. Ĉio surdiĝis, trankviliĝis, la ŝafaroj rigidiĝis, la sonoj de ties kolsonoriloj kvazaŭ deruliĝis kaj sin pikis en la teron, la homoj aŭskultis ĝue kaj admire, la birdoj silentiĝis en la branĉaroj, eĉ la sovaĝaj bestoj sin kaŝis, humiligitaj de nekonata kaj nevidebla forto.

— Tio estas nia Orfeo! — diris la simplanimaj montanoj.

Ili helpis al li ĉie, ili nutris lin, ili ŝirmis lin malgraŭ la ordonoj kaj la minacoj de la gardistoj kaj la persekutantoj. Ili inspiriĝis de la mirindaj kantoj kaj fieris pro li.

La persekutantoj sendis sian estron en la ĉefurbon ĉe la reganto, sciigante al li, ke ili malkovris la fuĝinton, sed bezonas armtaĉmenton por kapti lin. Kaj la taĉmento alvenis. Tio estis fortaj kaj moviĝemaj viroj sur malkvietaj kaj fortaj ĉevaloj. Ili embuskis ĉiujn vojojn, ĉiujn ravinojn, ili aperis tie, kie neniu atendis ilin. Tamen senlima, senfunda kaj netrairebla estis la montaroŝirmanto. Patrinecaj estis ties ĉebrustoj, varmaj ties ĉegenuoj por tiuj, kiuj kantis, vivis kaj batalis por la libereco de siaj hejmanoj. Ne surdiĝis plue en ĝiaj densejoj kaj rokaroj la kanto kontraŭ la reganto-tirano kaj ties korteganoj kaj helpantoj. La herbaroj en la valoj prenis la kantojn, la branĉaroj sur la rokoj transsendis ilin ĉiudirekten.

Kaj la sonoj sin portis ĉien, liberaj, fortaj kaj renovigataj, densaj kiel rezino kaj dolĉaj kiel mielo. Kaj kune kun la ribelo kaj la protesto, tavoloĝante profunde en la animoj kaj la koroj de la homoj, ili bruligis en la okuloj ion ĝojan kaj luman.

El la malproksima ĉefurbo alvenadis pli kaj pli da ĉevalrajdantoj kaj gardistoj. Ili disiris en la kabanojn de la montanoj, forigis ilin el ties ĉambroj, forrabis ties nutraĵon. Kaj la vetero malvarmiĝis, ekhurlis ŝtormoj, komencis superflugi neĝo. Alproksimiĝis la vintro, malsata kaj timiga. La arbaro delonge estis nudigita, nur la pinoj malhelis en la senlima kaj dezerta montaro. Nokte ĉirkaŭ la ŝafejoj hurlis sentimaj luparoj, konsterniĝintaj pro malsato. La egaj montaraj hundoj bojis tutan nokton.

Tamen pli timigaj ol la luparoj estis la persekutantoj de Orfeo, kiujn la reganto furioza pro kolero, senĉese sendis. Ili eniris en la ŝafejojn, elportis la plej grasajn ŝafojn, buĉis ilin, bakis ilin aŭ kuiris. La lanon kaj la peltajn rabprenis por si mem. La mizeraj montanoj, boliĝintaj, sed senfortaj, fosis la malsekan grundon, eltiris radikojn, rampis sub la avelarboj, palpis atente la putriĝintan foliaron kaj kolektis la defalintajn avelojn.

Sed de Orfeo estis nek sciigo, nek osto. Forkuris li ien, sin kaŝis, ne aŭdigis sin, ne vidigis sin.

— Forestas la knabo de Primo, ne estas jam ĉe nia montaro — petis la turmentitaj montanoj. — Foriru vi!

Sed la estroj de la persekutantoj ridetis ruze.

— Kaj li plu ne estas necesa al ni — diris ili, — al ni tie ĉi estas tre bone. Ja ni estas veraj regantoj en tiu ĉi montaro.

Tramordis lipojn la mizeraj montanoj. He, vidu ilin, tiuj parazitoj! Tiele, ili ne intencas foriri de tie ĉi!

La montanoj elfosis terdometojn, faris stalojn, konstruis rapide, per hazardaj materialoj laŭpove, novajn kabanojn kaj enigis sin interne, por ne formorti pro la malvarmegoj. Kaj post la vintro, kiam la suno ree ekbrilos kaj la arbaro reverdiĝos, tiam ili devos labori superforte, por nutri ankaŭ tiujn lupojn.

La montanoj transiradis de tempo al tempo en siajn bordelojn, interdemandis sin pri la situacio, plendis pro sia malbonstato, pripensis kion fari, kiam la arbaro reverdiĝos. Ili devos kontraŭstari kaj kontraŭstari firme. Aliel ili ne povos savi sin de tiuj parazitaj.

Kaj jen, ili ĝisatendis la finon de la vintro, eliĝis el la malsekaj terdometoj kaj mallumaj kabanoj, disiris en la densajn arbarojn. Kaj la kantoj de Orfeo resonis. Tamen nun ili estis tute novaj kantoj. Ili vokadis al kruela kaj nerepacebla batalo, batalo je vivo kaj morto kontraŭ la tiranoj-rabistoj. Ekkuris rajdantoj kaj gardistoj serĉi la ribelantan, malhumilan muzikanton.

Tamen malfacila fariĝis la serĉado. La padoj tra la montaro estis plenkovritaj per ŝtonoj kaj lignoj, la kabanoj, en kiuj tranoktis la persekutantoj, bruliĝis nokte, la ĉevaloj de la rajdantoj de l'reganto malaperis el la staloj, sur la gardistojn ĉe la krutaj vojkurbiĝoj falis ŝtonoj... La ŝafaroj malaperis el la kampoj kaj dronis ie ĉe l' arbarfundoj... La homoj sin kaŝis, la persekutantoj de Orfeo posedis plu nek asekuron sur la vojoj kaj en la kabanoj, nek panon.

Kaj la kantoj de Orfeo resonis en la montaro, sin portis super la arbaroj, plenigis la ravinojn, eĥis en la intermontoj... Suproj kaj rokoj transdonis ties ribeligan, batalan alvokon kaj la montanoj, kuraĝigite kaj unuigite faligis arbojn sur la vojon de la gardistoj, rompis la krurojn de ties ĉevaloj, atakis ilin tage kaj nokte.

Malfacila, obstina kaj heroa estis tiu batalo kontraŭ la tiraneco de la reganto kaj ties avidaj kaj adulecaj korteganoj, regionestroj kaj bandestroj. Ekbrulis kruela kaj nerepacebla lukto. La montanoj, organizitaj de Orfeo, inspiritaj de liaj mirindaj kaj neripeteblaj kantoj, leviĝis kiel unu homo. La nealireblaj rokaroj kaj la senlimaj netraireblaj arbaroj estis ties fortikaĵoj, la noktoj ties ŝildoj, la hakiloj kaj la hokstangoj — ties armilaro. Kadavroj de gardistoj, de rajdantoj kaj bandestroj sternadis la padojn ĉe la vojkurbiĝoj kaj rokaroj. Je unu loko la unua konsilanto kaj altrangulo mem estis falonta mortigita. Ektimis li pri sia vivo kaj sendis sciigon al la reganto, ke estas neeble plu resti en tiu sovaĝa kaj nekultura regiono. Kaj malfrue, kiam la krusto de la nuksarboj komenciĝis deŝeliĝi, venis ordono al la unua konsilanto reveni en la ĉefurbon kun ĉiuj persekutantoj.

La montanoj eliris el la densaj arbaroj, malsupreniris el siaj nealireblaj rokaroj kaj suproj, eniris siajn detruitajn domojn kaj komencis sin prepari por la vintro. Kaj super la montaro daŭre sin portis la kantoj de Orfeo. Sed nun ili estis kantoj por laboro, por la konkerita libereco kaj por la komuna feliĉo kaj bonstato de ĉiuj homoj. La dolĉaj sonoj karesis la animojn, flamigis la korojn kaj plifortigis la muskolojn por aranĝado de pli bona kaj pli feliĉa vivo...

Apogita al malnova kaviĝinta arbotrunko apud sia dometo, avo Taso aŭskultis la novajn kantojn de Orfeo, kaj, plensorĉite pro la mirindaj sonoj, flustris ekstaze:

— Mi reaŭdis lin. Kaj nun trankvile mi povas morti. Ĉar ĝis kiam mondo ekzistas, liaj kantoj sin portados sub la suno kaj la homoj rakontos pri li...

Tradukis: Steki

JUNULARA PRINTEMPA KANTO

Teksto: Ivan Radoev

Muziko: Todor Popov

Vigle, gaje

Mur-mu-re-tas la vent' en li-ber' ĉe la pop-loj jun-ver-daj, gra-cilaj. La prin-temp' pro-me-nan-te ju-bi-las su-per ni-a li-be-ra hej-m-ter', hej-m-ter', hej-m-ter'! Eh, ven-to, eh, ven-to, eh, flir-ta vent' ĉe l'fir-ma-men-to, a-mi-ko de l'ju-nec' sen-laca, en la dra-toj tin-tu vi, dis-por-tu la kan-ton ĉe l'gre-naj kam-poj de l'pat-ri'! de l'pat-ri'!

Murmuretas la vent' en liber'
ĉe la popoloj junverdaĵ, gracilaj.
La printemp' promenante jubilas
super nia libera
hejmtter'! (3)

Refreno:
Eh, vento,
eh, vento,
eh, flirta vent' ĉe l' firmamento,
amiko de l' junec' senlaca,
senzorge en la dratoj tintu vi,
disportu la kanton pacan
ĉe l' grenaj kampoj de l' patri'!

La branĉetoj sin vestas per flor',
la salikoj — per longaj festonoj.
Nun festadas birdetoj kaj homoj,
nun marŝadas la venka
labor'! (3)

Refreno...

Ni enspiras plenbruste kun ĝu'.
Vent, flirtigu la buklojn disblove!
La printempo svingadas denove
la standardojn en nia
patruj'! (3)

Refreno...

Tradukis: Stefan Kiraĝlev

BULGARISMOJ EN ESPERANTO

(Daŭrigo)

Ekde la pasinta numero ni prezentas bulgarajn popolajn dirojn kaj idiomajojn, donante en unua loko iliajn laŭvortajn tradukojn kaj post ĝi — interpreton de la signifo aŭ klarigon pri la uzo (en kiaj kazoj kaj kun kia senco).

Tradukante beletrajn verkojn, en kies stilo estas uzataj similaj esprimoj, oni ne povas ĉiam transdoni tiujn bulgarismojn per la prezentataj ĉi tie interpretoj, kiuj trologikigas la esprimon perdigante ĝian bildecon kaj sukecon. En tiaj kazoj sperta tradukanto penus krei bildecan esprimon, entenantan la sencon de la bulgarismo.

Ofte oni povus trovi aŭ verki tiaspecajn esprimojn en Esperanto — tio dependas de la kapableco kaj de la vigla intelekto de la tradukanto.

En aliaj lingvoj ekzistas proverboj kaj esprimoj, klaraj laŭ vortkonsisto, sed sufiĉe spritaj kaj sukoplenaj, kiuj respondus al la signifo de niaj bulgarismoj kaj sekve povus esti utiligataj ĉe similaj tradukoj (kompreneble, tio rilatas ne nur al la bulgarismoj, sed ĝenerale al ĉiuj naciaj idiomajoj). Eĉ kelkaj samaj proverboj kaj esprimoj estas troveblaj en pluraj naciaj lingvoj — ili do estas internaciaj. La «Proverbaro» de Zamenhof prezentas trezorejon, el kiu oni povus ĉerpi tiajn proverbojn kaj esprimojn, trafe adapteblajn por la menciita bezono.

Tia laboro prezentus daŭrigan stadion de la nun entreprenata kolektado kaj interpretado de la bulgarismoj.

Jen kampo feliĉa por utila kaj fruktodona laboro por deziremaj inteligentaj junaj samideanoj.

22. **Bera strah** — kolekti, amasigi timon=timegi.
23. **Bera stud** — kolekti, amasigi malvarmon=frosti.
24. **Ne beri griĵa** — ne kolektu (ne amasigu) zorgon=ne zorgu.
25. **Ne me biva** — mi ne taŭgas=esti malsana, ne esti sana kaj forta.
26. **Bilo i nebilo** (razpravjam) — (rakonti) kio estis kaj kio ne estis=faktoj kaj fantaziaĵoj (elpensaĵoj).
27. **Bistrja politika** — klarigi politikon=paroli, prikomentarii la politikan staton, politikajn eventojn.
28. **Bitijat bit** — la batita estas (ja) batita=kio okazis, estas neriparebla (nerestarebla).
29. **Bija na njakâde** — bati iudirekten=aludi pri io. Znam nakâde bieŝ — mi scias pri kio vi aludas.
30. **Bija v oĉi** — frapi en la okulojn=impresi, distingiĝi.
31. **Bija na ĉuvstva** — bati sur la sentojn=efiki konvinke, emociigante.
32. **Bija păt** — bati vojon=vojaĝi, marŝi (piede).
33. **Bija se v gârdite** — frapi sian bruston=emfazi siajn (efektivajn aŭ pliofte supozatajn) meritojn, laŭdi sin mem (pri iaj meritoj).
34. **Bija si glavata** (uma) — bati sian kapon (cerbon)=penegi kompreni, diveni, trovi solvon.
35. **Bija si ŝega** — bati al si ŝercon=ŝerci, rilati neserioze.
36. **Edin bie tâpana, drug sâbira parsata** — unu batas la tamburon, alia kolektas la (donac)monon=unu agas, alia profitas.
37. **Davam blagoslovijata si** (za neŝto) — doni benon pri io=konsenti pri io, permesi ĝian efektivigon.
38. **S blagoslovijata na...** — kun (per) la beno de... = kun la bonvola aprobo (permeso) de...

39. **Blâskam si angelîte** — kunpuŝi siajn anĝelojn = peni solvi ion.
40. **Podnasjam na bljudo** (na tepsija) — proponi sur plado = proponi prete postulante nenian laboron aŭ penon de la ricevanto.
41. **Vik (ŝum) do boga** — krio (bruo) ĝis dio = kriego (bruego).
42. **Za prava boga** — por la justa dio = senkulpe, nemeritite (ricevi panon).
43. **Predavam bogu duh** — doni sian spiriton al dio = morti, ellasi lastan spiron.
44. **Rabotja za bog da prosti** — labori por meritigi dian gracon al iu mortinto = labori (preskaŭ) senpage, senrekompence.
45. **Boda v oĉite** — piki la okulojn = aperi impresi, impresi forte, frapi la vidon per sia (ĉe)esto.
46. **Boja kravica** — dia bovineto = kokcinelo = trankvila kaj nenium ofendanta (ekscitanta) homo.
47. **Boji ĉovek** — dia homo = paca, pacema, malofendema homo.
48. **Ĥalvadĵija za bozadĵija** — vendanto de halvao¹ (porparolas) por vendanto de bozao² = pri personoj, havantaj samajn mankojn kaj malperfektaĵojn kaj subtenantaj (defendantaj) aŭ laŭdantaj sin reciproke.
49. **Drâpvam boj njakomu** — tiri baton al iu = bati iun.
50. **Ljagam bolen** — kuŝiĝi malsana = malsaniĝi.
51. **Ne e bolka za umiralka** — ne estas doloro, kiu povas kaŭzi morton = ne estas danĝera.

¹) Halvao — populara balkanlanda dolĉaĵo el sezama oleo, kuirita kun sukero.

²) Bozao — balkanlanda refreŝiga densa trinkaĵo el kuirita milio.

Ada

EN DISPUTO NASKIĜAS LA VERO

Pri la majuskloj

Vere Esperanto estas logika kaj regula lingvo, kaj la naciaj lingvoj, speciale iliaj nekorektecoj, ne devas influi al ĝia disvolviĝo.

Sed en sia artikolo «Esperanto kaj la majusklomanio» Vio esprimas opinion, kiu havas nenion komunan kun la logikeco kaj korekteco de Esperanto. Li ligas la skribadon de majuskloj kun kultoj kaj sanktaĵoj. Li nomas majusklomaniuloj ĉiujn homojn, kiuj skribas majusklojn. Laŭ mi tio tute ne estas regula.

En la sama momento, kiam la aŭtoro de la artikolo parolas pri la logikeco kaj korekteco de Esperanto, li nombras kelkajn regulojn pri skribado de majuskloj:

Ekz., unua regulo — la proprajn nomojn de la homoj oni skribas per majuskloj; dua — la unuan vorton de la nomoj de organizaĵoj, entreprenoj, revuoj ka.; tria — ĉe mallongigo oni skribas ĉiujn literojn per majuskloj ktp. Tiu regulo estas prenita el la bulgara ortografio.

Laŭ mi ekzistas unu sola regulo pri la skribado de majuskloj. Ĝi estas: Oni skribas per majuskloj la proprajn nomojn de la ho-

moj, de la organizaĵoj, entreprenoj, geografiaj terminoj, revuoj ka., sendepende de tio ĉu ili estas skribataj per ĉiuj literoj aŭ mallongigate. Per majuskloj oni skribas la unuajn literojn de ĉiuj vortoj, el kiuj konsistas la supre menciitaj nomoj. Ekz: Dobri Stanilov Dobrev (DSD), Bulgara Esperantista Asocio (BEA), Universala Esperanto-Asocio (UEA), Junulara Sekcio (JS), Centra Komitato (CK), Bulgara Esperantisto (BE), Ministerio de la Eksteraj Aferoj (MEA) ktp.

Oni devas skribi «Bulgara Esperantisto», ĉar, se oni skribus «bulgara esperantisto», oni komprenus «homon-esperantiston, kiu estas bulgaro», sed ne la propran nomon de la revuo «Bulgara Esperantisto». Oni skribas «Centra Komitato», ĉar temas pri propra nomo, sed ne ĝenerale pri centraj komitatoj. Korekte estas: «ĉiu granda organizaĵo havas centran komitaton» kaj «Plenkunsido de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio».

En tio mi vidas la logikecon kaj korektecon de Esperanto rilate la skribadon de majuskloj.

Dobri Dobrev

RECENZEJO

EL POPOLA ĈINIO, dumonata kultura gazeto eldonata de Ĉina Esperanto-ligo, n-ro 1 (52), jarkolekto 1959. Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio.

Dum la pasinta 1958 jaro reaperis tiu ĉi ŝatata organo de la diligentaj samideanoj en la malproksima Ĉinio. La unua n-ro ĉi-jara prezentas dikan 36-paĝan kajeron sur bela papero, kun klara preso kaj ilustraĵoj. La enhavo estas tre varia, leginda kaj interpretas al ni la diversflankan impeton de la ĉinaj popolamasoj por konstrui socialismon en sia grandega lando. La titoloj mem de la publikitaj artikoloj emfazas la variecon kaj gravecon de l' laborentuziasmo, de la rapida disvolvo de l' agrikulturo, industrio kaj socia vivo en Ĉinio. Legu kaj meditu: 10,700,000 tunoj da ŝtalo, Malpeza industrio de popolaj komunumoj, Vizito al Ĥanĵu-gubernio, Grandioza himno interneisma, La popola komunumo de Hjuŝuj, Al la pinto de la tekniko, Nova ferŝtala bazo en Vuhan, La brila ĉina medicino kaj farmacio, Tipa ekzemplo, Maljuna ŝafisto fariĝis profesoro, La kulturo de la epoko de la militantaj regnoj ktp. . . Krome kurso de ĉina lingvo, sciigoj, korespondanconcoj kaj recenzejo.

Kaj ĉio ĉi estas prezentata en pura kaj korekta bonstila Esperanto kun multaj trafaj fakvortoj, inter kiuj mi deziras citi nur: **agrikultura kooperativo, industriaj plantajoj, akvokonservejo, altfornego, fergisado, laminatado.**

«El Popola Ĉinio» estas abonebla pere de BEA kaj ni rekomendas al niaj sciamaj samideanoj aboni ĝin.

RAVENNA — esperanta gvidlibro, eldonita de Azienda Autonoma di soggi orno e turismo, Ravenna, Italio, formato 11 x 16 cm, 28 pg., prezo ne montrita (probable senpaga).

Malgranda, sed luksa gvidlibro pri la antikva urbo itala Ravenna, situanta ĉe l' bordo de l' Adriatiko maro. La libreto prezentas koncizan historion de l' urbo ek de la roma epoko kaj detalajn priskribojn de la ĉefaj monumentoj de Ravenna. Famaj estas la mozaikoj el la bizanca epoko. En Ravenna la granda itala poeto Dante finis sian lastan poemon kaj sian vivon. Nun Ravenna estas vigla urbo kun haveno (**Porto Corsini**), bela strando (Mavina di Ravenna) kaj maljuna pinarbaro — pinejo. Multaj nigraj kaj koloraj bildoj ilustras la enhavon kaj montras al ni la belajojn de tiu ĉarma ĉemara urbo itala.

Lingvajo — ĝenerale korekta kaj vive — klara. Mi nur preferus uzi **bizanca** anstataŭ la presita **bizantia**.

REVUO DE LA OKCIDENT-AŬSTRALIA ESPERANTO-LIGO, jaro 1958, n-ro 14, **Perth**, Western Aŭstralio, abonprezo ne montrita.

Stencilita tamen bonkvalita kaj ampleksa kajero kun interesoplenaj artikoloj originale en Esperanto verkitaj. Organo de malmultnombra pionira Esp.-ligo en tradicia angollingva mondparto, la revuo respegulas la varian kulturvivon de tieaj samideanoj. Jen nur kelkaj titoloj: **Raporto de la prezidanto, La propagando de Esperanto, Vizito al Ballarat, Ferioj en Nov-Zelando, Mirindaĵoj de Aŭstralio, Kuracistoj, Hiroshima** (valora originala raporto!) kaj aliaj.

Lingvo ĝenerale korekta kaj bonstila krom kelkaj superfluaĵoj akuzativoj; interalie mi notis la vortformon **fabrikejo** anstataŭ la kutima **fabriko**.

PACO — oficiala organo de la Mondpaca Esperantista movado (MEM), februaro 1959, n-ro 63, VI-jaro, Islanda eldono. Centr. red.: G. Holmkvist, Rönneholmsvägen 55, Malmö V, Svedio.

La plej nova numero de **Paco** estas eldonita de «**Mateno**», la islanda MEM-sekcio, sub redakto de Oskar Ingimarsson, kaj enhavas internaciajn kaj islandajn porpacajn artikolojn. Forte impresas la ĉefartikolo: **Perforto de imperio kaj la vivraĵoj de malgranda nacio**, de **Sigadur Gudmundsson**, kiu temas pri la konata perforto de l' islandaj teritoriaj akvoj fare de la britaj fiŝkaptistoj kaj militŝipoj. Multaj porpacaj kaj esperantaj artikoloj kaj sciigoj kaj kelkaj bildoj (interalie la portreto de D-ro L. L. Zamenhof) kompletigas la belan kajeron, kiu ankaŭ ĉe ni en Bulgario havas tre multe da legantoj kaj amikoj. La bela senligna papero kaj la klara tipografia aranĝo certe farus la gazeton modela, se ne enestus iom da malnecesaj akuzativoj (... fari al nian bonan...), superfluaĵoj — **ig'oj** (ombrigas, ŝanĝigi, informigas ktp.) kaj vortformoj kiel **okaziĝas, aperiĝos** (probable islandismoj?!).

St. M.

Pri rimarkitaj mankoj en la laboro de la asocia kancelario (neregula respondo al leteroj, nericevo de gazetoj k.a.) skribu tuj al la redakcio!

